

Shi Chengtai

Sur la spuro de Elpin

Resumo

Ĉirkaŭ la persono de Elpin (1907-1991) ĉiam estis iom da mistero. Naskiĝinte en Koreio, li pasigis grandan parton de sia vivo en Ĉinio. Li aktivadis por la korea sendependeco kaj kunlaboris kun ĉinaj esperantistoj kontraŭ la japana invado, interalie per la eldono de la revuo *Orienta Kuriero*. Post la milito li revenis al sia hejmlando, sed de 1950 preskaŭ tute malaperis lia spuro. La finajn jardekojn de sia vivo li pasigis en Norda Koreio; eĉ ĉinoj ne sukcesis restarigi la kontakton kun li.

* * *

En n-ro 7 de 1985 de *La Mondo*, la organo de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), aperis sub la titolo “Kie vi estas, Elpin?” artikolo de la ĉina veterana esperantisto Ĵelezo (Ye Laishi, 1911-1994), kiu esprimas sopiron al amiko dum sia junaĝo. La unua frazo estas: “Laŭ informo el Japanio Elpin jam estas for.” Tamen, Ĵelezo ne kredas, ke Elpin jam forpasis, kaj esperas, ke ĉinaj samideanoj ankoraŭ gajnos informon pri la farto de Elpin¹.

La nomo de Elpin ne estas nekonata al la ĉinaj esperantistoj. Malfermante la libron *Noveloj de Lusin*², oni trovas, ke la elĉinigitinto de ties unua peco “La taglibro de frenezulo” estas ĝuste Elpin. En 1991 Chen Yuan (1918-2004), la tiama prezidanto de ĈEL, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, publikigis esearon en *La Mondo* kun la titolo “Mi sopiras al ili...”, en kiu la tria peco temas pri An Useng. Elpin estas pseŭdonimo de An Useng. La Esperanta teksto de tiu artikolo de Chen Yuan aperis en n-ro 6, 1991, de *El Popola Ĉinio*.

Chen Yuan skribis en tiu artikolo:

En 1935-1936, kiam mi studis en la dua klaso de la industria kolegio [de Sun-Jatsen-Universitato en Kantono], en la tria klaso de la literatura kolegio venis nova korea studento. Li estis esperantisto Elpin veninta de Pekino al Ŝanhajo kaj de Ŝanhajo al Kantono. Inter la nordaj esperantistoj li nomis sin Elpin, sed inter la junaj kantonaj esperantistoj – Usan. Jam de la unua renkontiĝo ni interparolis nur en Esperanto [...].

Elpin estis kvieta, entuziasma kaj multescia. Li amis poemojn kaj verkis belajn versojn.

En tiu jaro Chen Yuan estis 17-jara, kaj Elpin 28-jara. Chen Yuan skribis plue:

Lia gaja rido enhavis iom da tristo. Tion sentis eĉ mi, dekkelkjara knabo. Tia tristo estis sama kiel tiu, kiun ni havis, kiam ni kantis la kanton ‘Sur Songhua-rivero’. Mi kaj miaj kamaradoj komprenis, ke la triston kaŭzis la longatempa okupado de la patrolando far la malamikoj kaj lia fuĝo al alia lando. Li kun granda fervoro partoprenis nian nacisavan movadon kaj samtempe klopodis por liberiĝo de sia patrolando. Ni neniam demandis lin pri lia familio nek pri lia politika aktivado ekster la kolegio. Inter ni ekzistis konfido, amikeco kaj entuziasmo.³

Elpin aktive partoprenis la agadon de la Esperanta societo “La Verdemularo” de Sun-Jatsen-Universitato, donis lecionon pri Esperanto-poezio en mezgrada kurso gvidata de Chen Yuan kaj korektis tagnotojn aŭ artikolojn de la kursanoj. Li ĉiam parolis Esperante kun esperantistoj en Kantono. “Same kiel Fedorĉak en Ŝanhajo, Elpin paroligis ĉiujn komencantojn

¹ *Verkoj de Ĵelezo* (ĉinlingva), Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo 1995.

² *Noveloj de Lusin*, Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo 1963; *Noveloj de Lusin. Plena kolekto*, Pekino: Fremdlingva Eldonejo 1974. – Samvolume troviĝas du aliaj pecoj, kiujn tradukis Elpin: “Naskiĝloko” kaj “Blanka lumo”.

³ Chen Yuan 1994: 251-252; Chen Yuan, “Elpin, homo neforgesebla”, en Choe Taesok 2004: 212.

en Kantono.”⁴ Elpin partoprenis en la redaktado de du periodaĵoj en Esperanto, *L' Infero* (1936) kaj *Internacia Solidareco* (1937), kiujn lanĉis Chen Yuan; en la dua Elpin publikigis siajn originalajn poemojn. Elpin, la korea patriota junulo, uzante Esperanton kiel ilon, partoprenis en la nacisava movado de la ĉina popolo.

Post la eksplodo de la kontraŭjapana rezistmilito en Ĉinio (1937) Elpin veturis al Hongkongo, kie li kunlaboris kun la tieaj samideanoj Ferenc Braun⁵ kaj Tikos (1907-1983) kaj kontribuis al revuoj en Esperanto de ili redaktataj, *Orienta Kuriero* (1938/39) kaj *Voĉoj el Oriento* (1938-1940); liaj verkoj kaj tradukoj en Esperanto de tiam plejparte aperis en tiuj revuoj⁶. Elpin faris tri tradukojn de noveloj de Lusin (1881-1936), kiuj aperis en la volumo *Elektitaj noveloj* de Lusin en Hongkongo, 1939⁷. Eble samtempe li kontaktis kun Ĵelezo, kontribuante al la revuo *Heroldo de Ĉinio* (1939-1944) redaktata de Ĵelezo, kiu ĉefe disvastigis eksterlanden informojn pri la kontraŭjapana rezistmilito en Ĉinio.

Fine de 1942 li venis al Ĉunkino (Chongqing). Chen Yuan skribis:

Nia lasta renkontiĝo okazis tiam, kiam la malamikoj kapitulacis. Iuvespere mi vizitis lin en lia loĝejo en Chongqing. [...] Mi haste adiaŭis lin [...]. Post la milito mi venis al Ŝanhajo kaj ĉie demandis pri li, sed estis neniu informo pri li. Post la liberiĝo de Pekino en 1949 mi venis al tiu urbo kaj demandis ĉinojn kaj alilandanojn por havi informojn pri li, sed malsukcesis.

Fine Chen Yuan emocie skribis: “Iuj diris, ke li ankoraŭ vivas, bone vivas kaj sin dediĉas ankoraŭ por la alta idealo en iu loko. Mi esperas, ke tio estos vera. Mi deziras feliĉon al li, granda amiko, kune kun kiu mi pasigis malfacilajn tagojn en la juneco.”⁸ Chen Yuan kaj Ĵelezo ne nur sopiris al Elpin, la samideano kaj amiko, batalinta kune kun la ĉina popolo dum la nacisava movado. En 1963 la Fremdlingva Eldonejo de Pekino eldonis la libron *Noveloj de Lusin*, en kiu enestas la tri tradukoj de Elpin. En la libro *Konciza historio de la ĉina Esperanto-movado* aperis pri li biografiaj notoj⁹. Kiam en majo 2008 en Harbino okazis la 5-a Esperanto-Kongreso de Nordorienta Ĉinio, ni donis al unu kunvenejo la nomon Salono Elpin; en ĝi okazis konversacia kurso kaj seminario pri la instruado de Esperanto.

Dum la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo, en septembro 1996, Chen Yuan renkontiĝis kun la korea Esperanta literaturisto Li Hajpin¹⁰. Dum ilia intima babilado en salono mi havis la honoron ĉeesti. Rememorante pri Elpin, ili kune bedaŭre veis pro la manko de informoj pri Elpin. De tiam ankaŭ ĉe mi troviĝas enigmo: Kie vi estas, Elpin?

En *Esperanto*, n-ro 7/8, 2007, mi legis, ke tiujare koreaj esperantistoj okaze de la la 9-a Tago de Pioniro omaĝis al sia pioniro Elpin per nove eldonita memorlibro¹¹. Mi ĝoje tuj rete kontaktis kun prof. Lee Jung-kee, la prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado

⁴ Chen Yuan 1994: 251-252; Chen Yuan, en Choe Taesok 2004. – Fedorĉak (Fedorcsák) estis hungara elektro-inĝeniero, kiu portempe laboris en Soveta Unio. En 1933/34 li restadis en Ŝanhajo kaj Kantono, rilatante kun esperantistoj. Vd. Chen Yuan, “Fedorĉak”, *El Popola Ĉinio*, 1991, n-ro 4, p. 14-15.

⁵ Pri Ferenc Braun vd. la prezenton sube kaj piednoton 15.

⁶ Ekzistas entute pli ol 50 verkoj de Elpin (tradukoj kaj originalaj artikoloj kaj poemoj); la pli multaj estas listigitaj en Choe Taesok 2004: 208-209. Vd. ankaŭ piednoton 19.

⁷ Post la milito, la tri tradukoj reaparis en la volumoj menciitaj en piednoto 1.

⁸ Chen Yuan 1994: 253; Chen Yuan, en Choe Taesok 2004: 213-214.

⁹ Hou Zhiping 2004: 60-61.

¹⁰ Li Hajpin (1917-1997), lernis kaj studis de 1924 ĝis 1939 en Ŝanhajo kaj Kantono, poste aliĝis al la kontraŭjapana batalo de la ĉina armeo. En 1944/45 li servis en la Liberiga Armeo de la Korea Respubliko. Post la japana kapitulaco li revenis al la hejmlando kaj dediĉis sin al la sudkorea Esperanto-movado. Li lernis Esperanton en 1935 ĉe Elpin en Ŝanhajo. Vd. Chen Yuan, “Hajpin Li”, *El Popola Ĉinio*, 1991, n-ro 7, p. 18-19; Hou Zhiping 2004: 62-63, kaj la nekrologon en *Esperanto*, vol. 90, 1997, n-ro 4, p. 80.

¹¹ Lee Young-Koo 2007.

(KAEM), kiu deziris ĉeesti nian 5-an Kongreson de Nordorienta Ĉinio. Prof. Lee alvenis al Harbino, kunportante la libron *Verkoj de Elpin*¹² donace al mi.

Leginte en la libro la antaŭparolon de Choe Taesok, la redaktoro de tiu volumo, kaj biografiajn notojn pri Elpin verkitajn de prof. Lee Chong-Yeong, mi finfine trovas spuron pri Elpin.

Elpin (An Ouseng en la ĉina lingvo aŭ An Useng en la korea) naskiĝis en la provinco Hŭanghe en la nuna Norda Koreio en 1907.

Li estas la nevo de AN Ĝunggun, korea patrioto, kiu en 1919 pafmortigis la japanan politikiston ITOO Hirobumi, ĉefrolulon por aneksi Koreion al Japanio. Pro la subpremo de la japana regantaro kaj por la nacisava movado, lia tuta familio komence migris al la orienta Rusio kaj en 1919 al Ŝanhajo en Ĉinio.

Lia patro An Gonggun laboris en la provizora korea registaro, kiun gvidis Kim Gu en Ŝanhajo; li estis unu el plej proksimaj kunlaborantoj de Kim Gu. Elpin studis en Furen-Universitato en Pekino kaj Sun-Jatsen-Universitato en Kantono, en 1936 li membriĝis en la Korea Junulara Avangardo en Nankino, kaj en 1940 li aliĝis al la Korea Sendependiga Armeo. En 1942 li fariĝis redakciano en la provizora registaro¹³.

Post la naciliberiĝo en 1945 Elpin revenis al Seulo, laborante por la menciita Kim Gu. Elpin lernis Esperanton en 1927, li scipovis la anglan, la ĉinan, la francan kaj la rusan lingvojn krom la gepatra, la korea. En decembro de 1945 li ĉeestis la fondkunsidon de Korea Esperanto-Instituto, prelegis kaj instruis Esperanton en kelkaj universitatoj. Antaŭ la Korea Milito (1950-1953) li, refoje forlasante Koreion, venis al Hongkongo. De 1950 malaperis lia spuro. Prof. Lee Chong-Yeong skribis: “Laŭ nekonfirmita raporto, Elpin iris iamaniere al Norda Koreio kaj mortis en sia hejmloko en 1991.”¹⁴ Estas notinda koincido, ke la artikolo de Chen Yuan rememoranta pri Elpin estis verkita ĝuste en tiu jaro!

Choe Taesok skribas en sia antaŭparolo al *Verkoj de Elpin*, ke, kiam li studis Esperanton en Eötvös-Loránd-Universitato en Budapeŝto, Hungario, li foje, en februaro de 1991, vizitis s-ron Károly Fajsz (1911-2004), la estron de granda privata Esperanto-biblioteko en Budapeŝto. Fajsz rakontis, ke venis al li junulo el Norda Koreio, kiu prezentis sin nepo de Elpin kaj menciis, ke lia avo, esperantisto, kunlaboris en Hongkongo kun la hungara esperantisto Ferenc (Francis) Braun¹⁵. Choe Taesok, aŭdinte tiun informon pri Elpin, forte emociiĝis. Li ankaŭ aŭdis, ke Fajsz kontaktis kun Ferenc Braun tiam loĝanta en Usono, kiu responde deklaris, ke, se Elpin vivas, tio ja estas “granda miraklo”!

Ni nun scias, ke la 22-an de februaro 1991, kvar tagojn antaŭ la interparolo de Fajsz kaj Choe, Elpin foriris de nia mondo. Sed restas al mi enigmoj: Kial Elpin foriris de Seulo? Kiel kaj kial li revenis al Norda Koreio? Kiaj estis liaj lastaj tagoj?

Mi estas tre scivolema. Feliĉe ni jam eniris la informan epokon: dank’ al prof. Lee Jung-kee mi korespondis kun Choe Taesok per la Interreto. Jen kion Choe koncize respondis al mi.

¹² Choe Taesok 2004.

¹³ Lee Chong-Yeong, “Biografiaj notoj pri Elpin”, en Choe Taesok 2004: 210.

¹⁴ Lee Chong-Yeong, en Choe Taesok 2004: 211.

¹⁵ Ferenc Braun (1896-1992), presisto, komitatano de Hungaria Esperantista Societo Laborista, en 1937 estis sendita al Ŝanhajo por esplori la eblojn presi librojn de la eldonejo Literatura Mondo. En 1938/39 li, sub la nomo Tsai Yan, kune kun Elpin eldonis en Hongkongo la monatan revuon *Orienta Kuriero*, kiu dediĉis sin al batalo kontraŭ la japana agreso. De la fino de la 70-aj jaroj ĝis sia morto li vivis en San-Francisko. Vd. Chen Yuan, “Braun”, *El Popola Ĉinio*, 1991, n-ro 5, p. 20; Hou Zhiping 2004: 61-62.

En 1948 Elpin laboris pri eksteraj aferoj en la provizora registaro de Kim Gu. El Seulo li akompanis Kim Gu al Norda Koreio por renkontiĝi kun Kim Il Song kaj intertrakti pri la unuiĝo de la tuta Koreio, sed tiu renkontiĝo ne alportis sukceson.

Kim Gu estis murdita en 1949. Supozeble la tiama sudkorea politika situacio instigis Elpin fuĝi al Hongkongo. Antaŭ 1945, vivante en Ĉinio, Elpin aktive partoprenis en la nacisava movado kaj progresema kultura agado. Ĉar liaj ĉinaj amikoj Chen Yuan kaj Ĵelezo estis komunistoj, Elpin kredeble estis ideo influita de ili. Verŝajne la tiutempaj aŭtoritatoj de Suda Koreio post la mortigo de Kim Gu ne toleris la politikan starpunkton de Elpin¹⁶. Poste Elpin revenis al Norda Koreio – mi supozas, post zorga konsidero. Laŭ Choe, “la nepo diris al Fajsi, ke Elpin bone fartas. Elpin havis funkcion en Norda Koreio”¹⁷. La registaro de Kim Il Song donis taskon al li, akorde kun la unuecfronta politiko de la komunisto reĝimo – ĉar li iam estis grava funkciulo en la registaro de Kim Gu kaj ĉar lian onklon oni konsideris heroo de la korea popolo.

Rilate la malaperon de lia spuro, de kiam li foriris de Seulo, ni, ĉinaj esperantistoj, kiuj travivis la katastrofon de la Kultura Revolucio (1966-1976), povas kompreni, ke Elpin ne plu povis aktive labori por la Esperanto-movado, ĉar la despotisma reĝimo ne toleris (almenaŭ ne subtenis) Esperanton. Tamen espero por ni troviĝas en tio, ke la nepo de Elpin jam vojaĝis eksterlanden! Mi kredas, ke koreaj esperantistoj povos doni pli multe da informoj pri Elpin.

Choe Taesok ja faris laŭdindan laboron: li kolektis de Elpin preskaŭ ĉion, kion li verkis aŭ tradukis en Ĉinio. La verkoj aperis en revuoj antaŭ 1945, inkluzive de tri originalaj poemoj (inter kiuj troviĝas la konata “Paca kolombo”, dediĉita al la japanino Verda Majo [Hasegawa Teru, 1912-1947]¹⁸), du originalaj noveloj kaj kvin prozaj tekstoj. Elpin estis eble la unua korea esperantisto, de kiu traduko el la korea en Esperanton aperis en neazia revuo¹⁹. Li ankaŭ estis la unua, kiu tradukis en Esperanton poemojn de la fama Ajĉing (Ai Qing, 1910-1996), la granda figuro de la moderna ĉina poezio. Ne estas mirinde, ke Chen Yuan skribis pri Elpin: “Li amis poemojn kaj verkis belajn versojn.”

Bibliografio

Chen Yuan (1994): *Libroj kaj homoj kaj mi* (ĉinlingva). Pekino: Sanlian.

Choe Taesok (2004, red.): *Verkoj de Elpin*. Seulo: Korea Esperanto-Asocio.

Hou Zhiping (2004, ĉefred.): *Konciza historio de la ĉina Esperanto-movado*. Pekino: Nova Stelo.

Lee Young Koo (2007): *La literatura mondo de Elpin* (korelingva). Seulo: Korea Esperanto-Asocio 2007.

Shi Chengtai

Nask. 1939. Laboristo, poste instruisto, direktoro de lernejo por surdmutaj infanoj (ekde 1987), nun emerito. Eklernis Esperanton en 1957. Ekde la 1980-aj jaroj kontribuis al revuoj en Esperanto. Liaj poemoj, noveloj, eseoj, recenzoj kaj tradukoj aperis en *Monato*, *Esperanto*, *Preludo*, *Fonto*, *La Gazeto* kaj aliloke. Redaktis beletran revueton *Penseo*, 1990-2000. Ĉefredaktoro de la libroj *Poemoj de Li Bai* (1996), *Poemoj de Du Fu* (2006) kaj *Poemoj de Tang-dinastio* (2007). Lia esearo *Vento sed kun spuro* aperis en 2009.

¹⁶ Ret-mesaĝo de Choe Taesok al mi, de 29-6-2008.

¹⁷ Kiel noto 16.

¹⁸ Vd. *Verkoj de Verda Majo*, Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo 1982. La poemo “Paca kolombo” (1939) estas represita ankaŭ en Choe Taesok 2004: 16.

¹⁹ La novelo “Almozulo” de Kim Dong In aperis en traduko de “Usan” (=Elpin) en *Literatura Mondo* (Budapeŝto), 1934, n-ro 9 (nov.), p. 161-162; represita en Choe Taesok 2004: 67-72. – Alia, pli frua traduko de Elpin estas “Florarbo jam plantita” de Ri Tae Jun, *La Verda Lumo* (Ŝanhajo), 1933, n-ro 5/6 (nov./dec.), p. 66-71. Krome, “Koreaj proverboj”, tradukitaj de Elpin, aperis en *Popola Mondo* (Ŝanhajo), vol. 1, 1950, n-ro 8, p. 6-7.